# HEJS

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO JUNULARA SEKCIO

**Nro. 41**
**Marto - Aprilo 1965**

**REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY**
POŜTKESTO 26
Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo




## Nova bildo Kaj stampilo por la membro Karto de H. E. J. S.

## AÑO NUEVO

Ciertamente, cualquier momento es bueno para iniciar en la vida un cambio que suponga mejoramiento de conducta o firme propósito de perseverar en ella, si ya era lo suficientemente ejemplar; pero como es frecuente hacer propósito de enmienda coincidiendo con el Año Nuemo, aprovechamos el actual para recordar nuestros deberes: Propagar el Idioma Internacional para facilitar, mediante su utilización práctica, las relaciones internacionales y el acercamiento de los pueblos del mundo; la paz de la tierra, profunda aspiración de los pueblos de todos los tiempos; la desaparición de las discriminaciones raciales y de todo orden, para hacer posible la instauración de una convivencia humana informada por los principios del amor, la justicia y la libertad; la dignidad de la persona, defendiendo los propios derechos y cumpliendo los correspondientes deberes; las relaciones mutuas entre las naciones mediante la colaboración económica, social, política, cultural, samitaria y deportiva; la eliminación del nacionalismo, el mayor enemigo de la convivencia entre los pueblos, terrible experiencia de odio y discordia emanada de los egoismos nacionales y del espíritu de emulación y prepotencia entre los pueblos y sus gobernantes; y finalmente, la constitución de una autoridad pública mundial, orientada al bien común de todas las gentes y cuyo objetivo fundamental sea la salvaguardia de los derechos de la persona humana.

Circular Enero 1965 de Grupo Esperantista de Bilbao

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## P O R T A D A

Dibujo de la insignia efectuado por Sr. Juan Bonell .

Grabado del mismo, preparado por nuestro consocio y colaborador Sr. Jordi Gumá.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

H.E.J.S.- KORESPONDA FAKO ===== GVIDANTO Sro. F. Parareda

Deziras Korespondi.

20agâ studentino. Ryszanda Felizak Warszawa. Novoslipki 9B/20. Pollando

20 jara studento de geodezio. Rudolf Tyller, Stribro, Brozikova 918. Cehoslovakujo.

## PRIPENSOJ AL EŬROPA UNIO

Sajnas ke la iniciale potenca impulso pri eŭropa unio kiu ekŝprucis post la lasta mondmilito bremsiĝas kaj bariĝas pro la renaskiĝo de certaj naciismo neĝustlokaj. Malgraŭ ke en kelkaj aspektoj oni progresis, precipe teknicaj kaj ekonomiaj, la spirita enfermo de certaj grupoj, kelkaj kun influo de estreco, povas veneni la grandiozan kaj nuran traireblan projekton al la Eŭropo solide kaj forte unuigita.

Hodiaŭ nur la projektoj faritaj grandskale estas esperigaj tiel en ekonomio kiel en politiko, kaj precipe en la homa kaj socia orientiĝo. Kelkaj ankoraŭ ne klare komprenis ke iu ajn projekto farita interskale nur atingos partajn rezultojn, kaj ĝi estos kaŭzo de prokrasto. Nur la progreso estos ebla kondiĉe ke la eŭropanoj laboru kune en ciuj medioj.

Estas komprebenla ke kelkaj, alkroĉigataj ankoraŭ en sia estinteco, pro la "grandeco" kaj "gloro" de sia imperio kaj de sia historio estu nekapablaj interne de sia statikismo ekvidi ke oni devas marsi, kaj oni marŝas, al nova koncepto. Sed vole aŭ nevole, post Eŭropo de la Komuna Merkato sekvos la Eŭropo de komuna kulturo, de komuna politiko de komuna entrepreno. Gi estas la destino kiun la gejunuloj deziras.

La junularo serĉas ĉie kaj en ĉiuj siaj kontaktoj pli bonajn formojn de komprenemo kaj se pro tio estas necesa forgesi la estinteco, tion faras volonte. La junularo scias ke tiamaniere ili perdas malmulton, kaj kontraŭe ili gajnos pli bonajn rezultojn ili atingos pere de la malfermo al la diverseco kiu produktos la unuecon. Iu ajn netolera sintenado kiu provokas resenton inter la homoj estas antisociala kaj antikristana.

Ni, la junuloj, deziregas ne plu dividojn, sed pli da amo kaj da unueco. Ni sopiras la Eŭropon ne de privataj kaj naciaj potencoj, sed la Eŭropon de la eŭropanoj en la sfero de instruado, laboro kaj politiko komunaj. La starigo de Eŭropa Parlamenta Asembleo sajnas la plej bona vojo por ekatingi ĝin

Josep Serrano

-o-o-o-o-o-o-o-

## NIA VIVO

Nia kara membro Tomás Allende unu el la fondintoj de H.E.J.S. kaj sia edzino, informis nin ke la antaŭa 11ª de Februaro naskiĝis sian filinon, nomita Susana. Korajn kaj sincerajn bondezirojn nome de la estraro kaj membroj ni deziras al ili .

# EŬROPA ESPERANTA KONFERENCO

PROVIZORA PROGRAMO

La "Eŭropa Esperanto-Konference 1965 " komenciĝas la 11-an de julio kaj fermiĝos la 17-an de julio 1965. La konferenca akceptejo jam fumkcias la lo-an de julio.

DEVIZO: Esperanto en la praktikon!

KONFERENCAJ TEMOJ:

1. Esperanto en komerco kaj industrio.
2. Esperanto en turismo.
3. Lingvaj problemoj en la internacia politiko.

| | | |
|---|---|---|
| Dimanĝo. | 11. 7. | Akceptado, Balo |
| Lundo. | 12. 7. | Inaŭguro. |
| Mardo. | 13. 7. | Tuttaga aŭtobusa ekskurso. |
| Merkredo. | 14. 7. | Laborkunsidoj, Urbvizitoj. |
| Jaŭdo. | 15. 7. | Tuttaga ŝipekskurso |
| Vendredo. | 16. 7. | Laborkunsidoj, Vizito de Grinzing |
| Sabato. | 17. 7. | Vizito de Schônbrunn, Adiaŭa Vespero |

## ĜENERALAJ INFORMOJ

KONSTANTA ADRESO : Austria Esperantista Federacio,
Wien XV, Funfhausgasse 16

KORESPONDADO. La oficiala lingvo de la konferenco estas Esperanto. En ĉiu korespondaĵo la skribanto citu sian konferecnumeron kaj aldonu respondkuponon,

KIEL PAGI : Rekte al la organiza komitato de ´EEK 1965
Banko: Erste Osterreichische Sparkasse
ĉekkonto; 000-99511

KORE INVITAS VIN LA ORGANIZA KOMITATO AL LA EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965 EN VIENO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NIA VIVO

S-ro Francisco Parareda nia secretario indikis al la redakcio sian baldaŭan edziĝon kun F-ino Rosa Prat dum la mezo de aprilo, Multan Feliĉon.

-o-o-o-o-o-o-o-

# 8ª INTERNACIA SEMINARIO EN NURBERG

## Temo " Ideologio kaj ŝtato "

Okazigita en Nurberg de la 27ª de Decembro ĝis la 3ª de januaro. Nurberg konata de ni ĉiuj pro sia grava historio, naskiĝloko de la fama pentristo-skulpisto Vert-Stok; kaj ankaŭ vidis la lumon unufoje la konata Martín Behain.

Tiá urbo gastigis afable sindone kaj bonkore la 118 partoprenantojn el la 16 landoj el 3 kontinentoj.

Nia junulargastejo estis belega kastelo situata meze la urbo, ĉarma loko kie ĉiutage elvenas kelkaj turistoj kaj urbanoj por ĝin admiri.

Ni donos etan rezumon pri ĉiuj okazintajoj ĉar mi ne deziras longigi la raporton.

27 Dimanĉon. Okazis la interkona vespero.

28 Lundon. Frumatene Prof. Ivo Lapenna parolis pri "Konceptoj de ideologio kaj ŝtato". Lia parolado el tute filozofa kampo estis ekstereordinara, jen parton de ĝi............ Ankaŭ ĉio necesas defini la bazajn konceptojn de la temaro por eviti miskomprenojn. Li alvenis al la origino de la vorto ideo, laŭ senco de Platono (Teorio de la formoj); ĝia signifo ekde la 17ª jarcento. La difino de Locke kaj la malfacilaĵoj kaŭzitaj de tiu difino; marksisma koncepto. Plursenco de la esprimo ideologio kiel studo de ideoj kaj instruo pri ili; kiel pensmaniero de individuo, klaso aŭ socia grupo ktp.. ktp. Fine Prof. Ivo Lapenna atentigis nin klopodi rigardi ĉion objektive kaj kompreni la diversajn opiniojn pri ideologio, kio tamen ne signifas akcepti ilin.

Poste D-ro Dieter Gernet prelegis pri "Komunaj trajtoj de la ideologioj" Resume li diras: Oni necesas edukadon al ĝenerala toleremo kaj instruado pri kelkaj bazaj faktoj pri la socia pskologio kaj sociologio. Sociologio kiel ideologia kritiko kaj praktika psikohigieno de la socia kaj politika vivo.

29 Mardon. Prof. Lucian Laurat prelegis pri"Reciproka influado de ŝtato kaj ideologio". La funkcio de ŝtato estas triobla. Eviti konfliktoj inter la sociaj kategorioj. Defendi la nacia kolektivo kontraŭ ekstera atako. Administri la rilatojn inter la individuoj. Prof. Laurat asertis ke en totalismaj reĝinoj, kie estas tolerata nur

unu sola partio kaj kie partaparato kaj ŝtataparato estas paralele kaj samdirekte ordigitaj, la ŝtato arogas la plenan kaj senliman diktatorecon sur ideologia tereno.

Denove Prof. Ivo Lapenna prelegis kaj pritraktis la temon "Influo de ideologio je la karaktero de ŝtato kaj Juro". Inter alie li diris: Ideologio ludis unuarangan rolon en la determinado de la karaktero de ŝato kaj juro de difinita epoko, kaj en la transformiĝoj, kiujn ili pasis tra la historio ĝis la nuntempo. Ideologio havos la saman signifon ankaŭ por la estonteco de ŝtato kaj juro, kio por si mem indikas ĝian gravecon.

Poste estis planita diskutado "Ĉu la esperantismo estas ideologio"? fare de la prexidanto de G.E.J. S-ro Zeillinger. Tio nur okazis post refuzado de tiaj argumentoj pro Prof. Ivo Lapenna.

Surproze alvenis 6 ĵurnalistoj el la plej famaj gazetoj de Nurberg, ili faris kelkajn demandojn kiujn estis respondítaj.

30 Merkredon. Ni faris urbgvidadon tra Nurberg, kaj je la 10a horo ni estis akceptita de la ĉefurbestro, kaj ni gustunis kompreneble, kolbosojn, bonan vinon, kaj bieron

Postagmeze Prof. Laurat pritraktis la temon: "Kontaktoj kaj kontraŭecoj inter nacia kaj klasa ideologio" Unuavide nacia kaj klasa ideologio ŝajnas kontraŭaj unu al la alia. Tia estas ofte sed ne ĉiam estas realo. La ŝtato ja potence kontribuas la formadon de nacia ideologio. Dum la unua periodo de la laborista movado ĝi starigis klasan ideologion kontraŭan nacia ideologio. Sed ofte la kontraŭecon inter nacioj estas pli malpli travestitaj en kontrŭecon inter klasoj.

Poste parolis S-ro Dieter Meiners pri "Demokratio kaj ekonomio". Por la nacioj "demokratio kaj ekonomio" mi nomas du sferojn diris la preleganto, kiuj en nia hodiaŭa vivo kuŝas tre proksime unu apud la alia, kaj li demandis Kiel nun estas la rilatoj inter ŝtata formo kaj ekonomia ordo? Ĉu speciala ŝtata formo ekz. la demokratio postulas certan ekonomian ordon aŭ ĉu estas tute egale, kiamaniere oni kombinas ambaŭ? Pli li asertis.: ĉiu asocio necesas ordon, speciale en livera socio, kie ĉiu individuo ĝenerale rajtas agi, kiel li volas. Tia ordo devas baziĝi sur etikaj principoj, kiuj ne nur utilas al la interesoj de malmultaj sed kontraŭe de la plimulto. Ĉar sen la etika bazo la ordo ne efikas.

31 Jaŭdon. Prof. Ludwig Thalmer prelegis pri "Ŝtato kaj kristanismo". La ŝtato baziĝas sur la naturo de la homo. Unuflanke sur la socia karaktero de la homo, aliflanke sur la korpaj kaj spiritaj bezonaĵoj de la homo, kiujn li ne povas

kontentigi en la izoleco. La preleginto agnoskis: ĉar Dio kreis la ĥoman naturon, en la menciita maniero la ŝtato estas laŭ volo de Dio. La ŝtata aŭtoritato havas limojn..... la unua limo estas la volo de Dio, kiu montriĝas en la morala naturleĝo kaj en la dia supermatura revelacio.

Poste estis anoncita la prelego de D-ro Azzi, kiu pro malsano ne ĉeestis, tamen, li sendis sian manuskripton kiu estis voĉlegita pere de D-ro Minnaja. La temo estis...: "La fasisma ideologio kaj la ŝtato, reciprokaj influoj".(La temo limigis al la itala faŝismo). La faŝisma ideologio baziĝas sur la kredo al la milito kiel instigilo de la homaj energioj kaj ĝi influas tiusence la tutan edukadon de la junularo, monopoligitan de la stato. Faŝismo neas la doktrinon de la socialismo kaj la atingon de la ekonomia feliĉo, Same faŝismo repuŝas entute la demokratajn ideologiojn ĉu teorie ĉu praktike, kaj tiel ankaŭ la politikan egalecon.

Postagmeze S-ro Ivo Osibov prelegis pri: Reciproka influo de ideologio kaj ŝtato en la konkreta ekzemplo de postmilita Jogoslavio". Ŝtato kiel unu el la irganizaj kadroj de la homa socio ne ekzistas de eterne, sed ĝi evoluas el la prakomuno kiam ekrestis produkfortojn kaj kiam aperis individuan privatan proprecon.

Vespere. S-ro Edwin Thomas prelegis en la kadroj de "Kelkaj aspektoj de la svisa demokratio" Svislando estas demokratio ekde 1291, laŭdire la plej malnova de Eŭropo.

La lasta prelego estis farita de S-ro Humphrej Tonkin "Literaturo kaj ideologio". Li faris tre brilan prelegon, tamen limigante sin al soveta literaturo. Ĉu fakte influas la ŝtatan ideologion en la literaturo.

Dimanĉon. Nia lasta komuna tagmanĝo, diskutoj, akcepto de konkludoj kaj adiaŭoj. Sincere mi trovis la programon tro plena, ni ne havis tempon por diskuti unu prelegon,ĉar tuj devis komenci la alian kaj tio ne estas plej taŭga, Tamen mi ne necesas tion averti, al la estraro de G:E.J.. ĉar ĝi atente promesis por sekvonta okazo ne fari la saman eraron.

Karaj gesanideanoj estu bonvenaj al la 9ª Internacia Seminario en Hamburgo. Hamburgo atendas vin!.

H:E.J.S.- reprezentantino
F-ino Mercedes Carrasco

-o-o-o-o-o-o-o-o-

TRADUKA KONKURSO. La Redakcio atentigas al la legantoj ke en la J.F.- bultenno aperis Tradukan Konkurson,.Feliĉe alvenis al la Redkcio kelkajn bonajn tradukojn, tamen ni esperas pliajn partoprenantojn. HEJS-membroj sendu akurate al la redakcio viajn tradukojn.

## LISTA DE PROSPECTOS TURISTICOS GRATUITOS

Socio escribe a las siguientes direcciones en Esperanto pidiendo 20 ejemplares, distribúyelos entre tus amigos y amistades de esta forma podrás mostrar la utilidad del Esperanto turísticamente.

Inglaterra. "Hastings and St. Leonhards"
The British Travel Association, 64/65 St. James street. Piccadilly. LONDON, S.W. 1 Inglaterra.

Austria. "Malsupra Austrio" Werbwamt der Landesregierung von Niederösterreich. WIEN. Austria
"Steyr". Kulturamt der Stadt. Steyr, STEYR. Austria

Dinamarca. "Bonvenon al Danmark"
Herbergs-Ringen, Vesterbrogade 35 Copenhague. Dinamarca.
"Kie abundo estas malofta"
La Ministerio pri Eksterlandaĵ Aferoj, Pressebureauet, Christiansborg. KOPENHAGO. Dinamarca.

Francia. "Aubenas en Vivarezo".
Tursimo-Oficejo, Place de l'Airette, AUBENAS
"Vizitu la Benedictine".
Benedictine, FECAMP, (Seine-Inf) Francia
"Nancy" Turisma Servo, 9 rue des Dominicains
NANCY Francia.

Alemania "Dusseldorf". Werbe-und Verkehrsamt.
4 DUSSELDORF. Alemania
"Hamburg". Fremdenverkehrs-un Kongresszentrale
2 HAMBURG 1. Alemania.

Italia. "Aosta Valo" Assessorato Regionale Turismo
AOSTA. Italia.
"Ravenna". Restado kaj Turisma Sendependa
Kontoro, via XIII Giugno 2 RAVENNA, Italia.

Suecia. "Lund" Luns Turisttrafikförening, LUND. Suecia.

Suiza. "Birdrigardkarto de Svislando" Svisa Turisma
Centralo, ZURICH. Suiza.

Usono. "Novjorko" Burɒo por Kongresoj kaj Vizitantoj de
Novjorko, 90 East 42 nd. Street, NEW YORK 17. N.Y.

-o-o-o-o-o-o-o-

## H.E.J.S.- DELEGACIO BARCELONO

CASANOVA 57-6-6ª ĵaŭde - sabate de 7,30 ĝis 9,30 h.

Actividades: Culturalmente nuestra delegación ha tenido durante estos primeros meses del año mucha actividad, destacando por su interés los siguientes actos.

Conferencia a cargo del Prof. Jaime Aragay bajo el lema "Progreso y Civilización"

2 charlas culturales una de ellas, a cargo de nuestro colaborador Juan Vélez, sobre: "Problemas de adaptación Juvenil y la segunda a cargo de S. Aragay el tema "Dinero" con comentario a la película "La visita del rencor".

Asimismo cada sábado ha continuado el curso medio de Esperanto a cargo del Prof. Jaime Aragay.

Debido a la imposibilidad de informar a los socios de los próximos actos culturales, rogamos se sirvan asistir los jueves y sábados a las reuniones de nuestro local social en donde serán informados de las próximas conferencias.

Excursionismo: Asimismo tuvieron lugar las siguientes excursiones:

Febrero. Dia 14. Lago Esperanto. Asistieron. Francisco Ruiz, Josep Girona, S. Aragay, Juanita Vilar y Josefina Girona.

Marzo. Dia 14. S. Salvador de las Espases. Asistieron: Juanita Vilar, Josefina Girona, Magencia Garcia, Maruja Rubio, Mª Angeles Ruiz, Teresa Illanas Francisca Escolar, y Josep Girona, Juan Font, José Sanz. S. Aragay, Francisco Ruiz, José Castro.

Dia 28. Igualada. Asistieron: Magencia García, Josefina Girona, Teresa Illanas, y Francisco Ruiz, Juan Font, S. Aragay uniéndose al grupo en Igualada, el Sr. Castelltor y 8 igualadinos.

Cabe destacar que nuestro socio Sr. Castelltor nos mostró los monumentos más importantes de Igualada y sus alrededores; asimismo se trató la posible organización de un grupo juvenil en la ciudad y la posibilidad de encontrar algún terreno para edificar la Residencia-Refugio de H.E.J.S

-o-o-o-o-o-o-o-

MADERAS CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24

BARCELONA (14)

jovani

el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA

y

TEJEDORA

ROSITA GALBANY

ELDONEJO KOKO